DUA BULTENO

96-a Universala Kongreso de Esperanto

KOPENHAGO 23-30 JULIO 2011

Kongresa temo: DIALOGO KAJ INTERKOMPRENO

Enhavo

Loka Kongresa Komitato ..... interna frontkovrilo
Por eniri la landon 2
Utilaj informoj pri Kopenhago kaj Danio 3
Loĝado en Kopenhago 4
  Hoteloj 5
Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj 7
  Antaŭkongresaj ekskursoj 8
  Postkongresa ekskurso 11
Dumkongresaj ekskursoj 12
  Tuttagaj ekskursoj 13
  Duontagaj ekskursoj 16
  Semajna skemo de ekskursoj 18
Bankedo 19
Provizora programo 20
Programeroj dum UK 20
Kiu kongresas kiam kaj kie? 22
Ĝeneralaj informoj 22
Kontaktinformoj 24
Kongresaj perantoj ..... interna dorskovrilo

Kovrila dezajno de Henriette W. Danielsen. Gobeleno "Vikingetid" (Vikinga epoko) de Bjørn Nørgaard, publikigita kun permeso de la artisto kaj de la reĝa familio.

Loka Kongresa Komitato

Prezidanto, eksteraj rilatoj	-	Ileana Schrøder
Vicprezidanto, ekskursoj	-	Finn Østerbæk
Kasisto	-	Arne Casper
Loĝiga servo	-	Bent Jensenius
Arta programo	-	Ole Therkelsen
Gazetara servo	-	Jens S. Larsen
Junulara programo	-	Regin Larsen
Kongresa retpaĝo	-	Tara Gregers
Grafikaj servoj	-	Henriette W. Danielsen
Kongresejo	-	Rasmus Høyrup Jensen
Helpantoj	-	Stanislaw Mielczarek

96-a Universala Kongreso de Esperanto

DUA BULTENO

Kopenhago

23-30 julio 2011

Por eniri la landon

Ĝenerale. Bonvolu noti, ke la reguloj pri vizdonado malsamas laŭ landoj, kaj ke ili konstante ŝanĝiĝas. Tial bv. nepre mem kontroli ĉe la plej proksima dana diplomatia reprezentejo (bv. mem trovi ties adreson en via ĉefurbo aŭ najbara lando), ĉu vi devas havi vizon kaj sub kiuj kondiĉoj. UEA/LKK ne povos helpi pri vizpetoj faritaj post la 1-a de majo 2011, kaj principe ne povos respondi al tiuj petoj.

Dokumentoj. Ĉiu vizitanto devas posedi pasporton validan minimume ses monatojn post la alvendato, koncernan vizon, samkiel revenbileton. La kongresanoj mem devas zorgi pri la akiro de vizoj. En escepte komplikaj kazoj oni povas peti helpon de UEA/LKK.

Konfirmiloj kaj invitleteroj. Normale la Kongresa Konfirmilo devus sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco. La konsulejoj povas postuli oficialan invitleteron, kiun UEA sendos se oni petas ĝin. Al nealiĝintoj oni ne povas sendi invitleterojn nek aliajn konfirmaĵojn. Bv. konscii, ke nek UEA nek LKK povas influi la decidojn de la konsulejoj.

Datoj. Bv. noti, ke la invitletero povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresdaŭro (23-30 julio, eventuale plus daŭro de menditaj antaŭ- kaj/aŭ postkongresoj). Se vi bezonas pli longan restadon, tion vi devas aranĝi private.

Mongarantioj. Senkonsidere ĉu oni havas aŭ ne la vizon, necesas pruvi ĉe la eniro en la landon, ke oni posedas sufiĉajn monrimedojn por la restado. Al kongresanoj, kiuj mendis kaj pagis loĝadon pere de UEA (aŭ venas je aparta invito de UEA), oni povas sendi, se necese kaj laŭ peto, konfirmon pri pagitaj servoj. Tio povas parte kompensi la postulon pri posedo de sufiĉaj monrimedoj. UEA kaj LKK ne donas financajn garantiojn al kongresanoj el nepagipovaj landoj. Kongresano mem devas pruvi al la vizdona instanco posedon de sufiĉaj rimedoj por restado en la kongresa lando.

Asekuro. Unu el la postuloj por ricevi vizon estas akiro de asekuro, pri kio la kongresanoj zorgu mem. Ofte tute taŭga asekuro estas aĉetebla en flughavenoj. Sendepende de tio, ĉu necesas havi vizon aŭ ne, ĉiu kongresano prefere asekuru sin por la daŭro de la vojaĝo kaj restado.

Uzitaj poŝtmarkoj valoras!
UEA daŭre akceptas uzitajn poŝtmarkojn por vendo al filatelistoj. Anstataŭ forĵeti ilin, bv. kunporti ilin al la 96-a UK en Kopenhago por transdoni en la kongresa libroservo.
Bv. eltondi la markojn kun minimume 1-centimetra marĝeno aŭ – eĉ preferinde – bv. kunporti tutajn kovertojn.
Kompreneble eblas ankaŭ sendi poŝtmarkojn al la Centra Oficejo tra la tuta jaro.
Koran dankon!

Utilaj informoj pri Kopenhago kaj Danio

Situo: Danio situas en Skandinavio, en la norda parto de Eŭropo. La ĉefurbo estas Kopenhago (ankaŭ la plej loĝata urbo). De Kopenhago oni rapide atingas la svedan urbon Malmö, transponte.

Loĝantaro: Danio havas ĉ. 5 550 000 loĝantojn, kaj el tiuj ĉirkaŭ unu miliono loĝas en la kopenhaga regiono.

Klimato: La someroj estas kutime modere varmaj -- la mezaj temperaturoj varias inter 18°C kaj 27°C. Ofte pluvas, sed la lasta parto de julio estas kutime varma kaj sunplena.

Lingvoj: La dana estas la sola oficiala lingvo. Multaj kapablas paroli angle, sed nur kelkaj (precipe maljunuloj) germane.

Elektro: La elektra tensio estas 230-volta. La kontaktiloj estas rondaj dupolusaj.

Interreto: Senpagaj retkonektoj atingeblas en pluraj lokoj: en multaj S-trajnoj, en diversaj hoteloj, en la kafejoj "Baresso". Troviĝas ankaŭ retkafejoj, kie oni uzas Interreton kontraŭ pago.

Laborhoroj: Vendejoj kutime laboras de la 10h00 ĝis la 17h30 de lundo ĝis vendredo. En vendredo multaj grandaj butikoj funkcias ĝis la 20h00; sabate, kutime de la 10h00 ĝis la 14h00. Pluraj manĝaĵvendejoj kaj superbazaroj estas malfermitaj dum semajnfinoj.

Loka tempo: UTC +1 horo.

Medikamentoj: Se vi uzas preskribitan medikamenton, bonvolu kunporti kuracistan recepton en la latina. Apotekoj funkcias dum la normalaj laborhoroj (vd. "Laborhoroj", supre). Apoteko malfermita tage kaj nokte estas Steno Apotek, Vestergade 6C, 1620 Kopenhago V, proksime al la ĉefstacidomo.

Memoraĵoj: La plej tipaj memoraĵoj el Kopenhago estas aĉeteblaj en specialaj butikoj, precipe en la piediraj stratoj centre de la urbo.

Mono: La oficiala mono estas la krono (dane *krone*, mallonge kr. aŭ DKK), dividita en 100 oerojn (*øre*). Monbiletoj: 50 kr., 100 kr., 200 kr., 500 kr. kaj 1000 kr. Moneroj: 50 øre, 1 kr., 2 kr., 5 kr., 10 kr. kaj 20 kr. Monŝanĝado eblas en la flughaveno, stacidomoj, bankoj kaj monŝanĝejoj. Multaj hoteloj, restoracioj kaj vendejoj akceptas kreditkartojn (VISA, Eurocard/MasterCard, American Express).

Sanservoj: Eksterlandanoj bezonas konfirmilon pri sanasekuro. UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj.

Sekureco: Kopenhago estas sufiĉe sekura, sed kiel en aliaj ĉefurboj ekzistas zonoj/lokoj malsekuraj vespere kaj nokte. Gardu viajn monon, poŝtelefonon kaj gravajn dokumentojn, ĉar somere poŝ-ŝtelistoj aktivas en la urbo.

Telefonado: La prefikso por telefoni de eksterlando al Danio estas +45. Por telefoni de Danio al eksterlando: 00 + landokodo + telefonnumero. Eblas telefoni de ĉiuj telefonbudoj rekte al eksterlando. La telefonbudoj funkcias per telefonkartoj aĉeteblaj en poŝtoficejoj kaj gazetaj kioskoj.

Gravaj telefonnumeroj: Polico 114, fajrobrigado kaj urĝa medicina helpo 112.

Transporto: Rekomendinda estas la tutsemajna bileto (7-taga) por du zonoj, aŭ aĉeti 10-fojan (unuhoran) bileton (unuopaj biletoj kostas pli). Vi bezonas du zonojn, se vi loĝas proksime al la kongresejo kaj ankaŭ vizitas la urbocentron. Notu, ke la bileto utiligeblas en la metroo, en S-trajnoj, en busoj kaj aliaj trajnoj. Legu pli pri la danaj transportbiletoj ĉe http://www.96uk-kopenhago.dk/Transport-biletoj.html.

Trinkakvo: La kranakvo estas bonkvalita kaj senhezite trinkebla.

Transporto al la kongresejo: La kongresejo estas atingebla ankaŭ per publika transporto (metroo, busoj kaj taksioj). El la flughaveno preni trajnon ĝis stacio Ørestad, tie ŝanĝi al metroo direkte al Vanløse kaj eliri en la tuj sekva stacio: Bella Center. El la urbo preni metroon al Vestamager (linio M1) kaj eliri en la stacio Bella Center. Ankaŭ busoj 30 (el stacio Vesterport kun halto i.a. ĉe la centra stacidomo) kaj 4A (el stacio Svanemøllen, tra Valby- kaj Sjælør-stacioj, ĝis Sundbyvester Plads) haltas ĉe Bella Center.

Loĝado en Kopenhago

Ĝeneralaj kondiĉoj de mendoj: La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj dorsflanke de la mendilo kaj plurloke en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Bv. nepre legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

Loĝado: Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la hotelo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la forlaso aŭ foriro de la hotelo; do, la daton de la lasta mateno en la hotelo.

Eniro kaj eliro: Principe, eblas okupi ĉambrojn post la tagmezo de la mendita dato, kaj necesas forlasi la ĉambrojn antaŭ la tagmezo de la lasta tago. Se vi ne okupas ĉambron dum la unua mendita tago, oni nuligas la rezervon kaj vi perdas la plenan pagitan sumon por la tuta restadperiodo!

Dulitaj ĉambroj kaj hazarda kunloĝigo: La loĝiga servo ne povas aranĝi hazardan kunloĝigon de nekonatoj, pro kio dulitajn ĉambrojn oni disponigas nur al duopoj kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj. Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi al homoj kiuj nepre volas loĝi en dulitaj

(aŭ plurlitaj) ĉambroj sed ne havas kunloĝanton, sur la retpaĝo de la kongreso (http://www.uea.org/kongresoj/uk_2011.html) troveblas anonctabulo por tiu celo.

Frueco de la mendo kaj alternativaj mendoj: Ĉar la mendeblaj kapacitoj ne estas senlimaj, kaj precipe ĉar la kongreso okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue, kaj ne eblas garantii la plenumon de la originala mendo ĉiam laŭ la preciza deziro de la mendanto. Tial ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn. En la retpaĝo de la kongreso eblas scii, kiuj hoteloj jam estas plenaj.

Pagoj: La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago.

Ofertataj servoj: Se ne estas menciite alie, la ĉambroj de la hoteloj havas necesejon kaj duŝejon (kelkaj ankaŭ bankuvon), kaj la prezo inkluzivas matenmanĝon.

Limdatoj: La limdato por fari mendojn estas la 1-a de majo 2011. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte, ĝis la 1-a de junio, kaj nepre kontraŭ aparta krompago (40 eŭroj). Eblas malmendi nur ĝis la 25-a de majo 2011! Pri la ceteraj malmendaj reguloj konsultu la dorsflankon de la mendilo.

Loĝkonfirmo: Minimume unu monaton antaŭ la UK vi ricevos konfirmon pri via loĝado, kun detalaj informoj pri via hotelo kaj aliaj kongresaj gravaĵoj.

La prezoj estas en eŭroj (EUR) por unu persono por unu nokto, escepte ĉe la studenta loĝejo, kies prezo estas por la semajno.

Hoteloj

1. Bella Sky Comwell (4★) – http://www.bellaskycomwell.dk
Center Boulevard 5, DK-2300 København S
☎+45 70 274 274; booking@bellasky.dk

Senfuma, luksa kaj originala hotelo Bella Sky situas ĉe la kongresejo kun rekta, interna ligo al ĝi. Ĵus ekkonstruita, ĝi inaŭguriĝos en majo 2011. Pro sia originala dezajno, du turoj kun 15 gradoj da kliniĝo – unika en la mondo! – praktike ĉiuj ĉambroj estas unikaj, tamen kun similaj komforto kaj kvalitoj, meblar-ekipitaj per miksaĵoj inter klasika dana dezajno kaj novaj tendencoj. Ĉiuj ĉambroj havas i.a. klimatizilon, fridujeton, senpagan sendratan retan aliron, sekurŝrankon, kaj televidilon kun memelekteblaj filmoj. La hotelo krome havas kafejojn, restoraciojn, gimnastikejon kaj belecan/bonfartigan klinikon.
Prezo en ĉambro: unupersona 114 EUR, dulita 64 EUR.

2. Cabinn Metro Hotel – http://www.cabinn.com/english/kbh/metro/metro.html
Arne Jakobsens Allé 2, DK-2300 København S
☎+45 32 465 700; ❑metro@cabinn.com

Moderna kaj nova hotelo, Cabinn Metro troviĝas en promendistanco de la kongresejo (1 km). Ĉiuj ĉambroj havas propran necesejon/duŝejon, telefonon, televidilon, kaf-/teo-aparaton kaj senpagan sendratan retaliron; ili estas ankaŭ bone sonizolitaj. En la akcepteja halo estas 24-hora trinkejo/manĝejo. La ĉambroj diferencas laŭ la grandeco, t.e. ekonomia estas malpli granda ol normala ktp.
Prezo en ĉambro ekonomia: unupersona 73 EUR, dulita 50 EUR.
Prezo en ĉambro normala: unupersona 81 EUR, dulita 54 EUR, trilita 44 EUR, kvarlita 39 EUR.
Prezo en ĉambro Commodore: unupersona 87 EUR, dulita 59 EUR.
Prezo en ĉambro Captain: unupersona 98 EUR, dulita 63 EUR.

3. Cabinn Scandinavia Hotel – http://www.cabinn.com/english/kbh/scandinavia/sca.html
Vodroffsvej 55, DK-1900 Frederiksberg
☎+45 35 361 111; ❑sca@cabinn.com



Malmultekosta hotelo en la urbocentro de Kopenhago je 300 metroj de la metrostacio Forum (rekta linio al la kongresejo) kaj 1,1 km de la Tivoli-amuzocentro. Ĉiuj ĉambroj havas propran necesejon/duŝejon, telefonon, televidilon, kaf-/teo-aparaton kaj estas bone sonizolitaj. En la akcepteja halo estas 24-hora trinkejo/manĝejo, kie troviĝas ankaŭ senpaga sendrata retaliro.
Estas du diversaj ĉambrokategorioj laŭ grandeco: ekonomia (por maksimume du personoj) kaj normala (ĝis tri personoj).
Prezo en ĉambro ekonomia: unupersona 74 EUR, dulita 50 EUR.
Prezo en ĉambro normala: unupersona 81 EUR, dulita 54 EUR.

4. Studenta loĝejo Håndværker Skolehjemmet I København
Bispebjerg Parkalle 12 D, 2400 København
☎+45 3956 3444
La loĝejo troviĝas je proksimume 100 metroj de la trajnstacio Emdrup, de kie iras trajnoj al la metrostacio Nørreport (5-minuta piediro inter la trajn- kaj metrostacioj!). El Nørreport estas rekta ligo metroe al la kongresejo. Komforta studenta loĝejo. La prezo inkluzivas lito- kaj bantukojn.
La prezoj estas fiksitaj por la semajno (de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2011). Tio signifas, ke ***ne*** *eblas mendi ekster tiuj datoj. Same, se oni restas malpli ol sep tagojn, oni devas pagi la plenan sumon!*
Prezo por la semajno *en ĉambro: unupersona 300 EUR, dulita 190 EUR.*

5. City Public Hostel – http://www.citypublichostel.dk
Absalonsgade 8, DK-1658 København V
☎+45 33 550 081; 🖳info@citypublichostel.dk
Malmultekosta amasloĝejo je 10-minuta promeno de la urbocentro. La akceptejo estas 24-hore malfermita. Ĉe la enirhalo estas senpaga sendrata retaliro; se vi ne havas komputilon, vi povas uzi tiun de la ejo kontraŭ pago. Akceptas nur kontantan monon. Por pliaj informoj kaj mendoj, bv. rekte kontakti City Public Hostel laŭ la supraj adresoj.

6. Tendaro: Absalon Camping – http://www.camping-absalon.dk
Korsdalsvej 132, DK-2610 Rødovre
☎+45 36 410 600; 🖳absalon@dcu.dk
Por pliaj informoj kaj mendoj, bv. rekte kontakti Absalon Camping laŭ la supraj adresoj.

7. Tendaro: Copenhagen Camping – http://www.copenhagencamping.dk
Bachersmindevej 11, DK-2791 Dragør
☎+45 32 942 007; 🖳info@copenhagencamping.dk
Por pliaj informoj kaj mendoj, bv. rekte kontakti Copenhagen Camping laŭ la supraj adresoj.

Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj

Skandinavio estas belega regiono kun ravaj pejzaĝoj, riĉaj folkloro kaj internacie konata dezajno. Jen ni proponas du antaŭkongresajn kaj unu postkongresan ekskursojn.

La prezoj inkluzivas:
– restadon en komfortaj hoteloj;
– matenmanĝojn en la hoteloj;
– se indikite en la ekskurspriskriboj, ankaŭ aliajn manĝojn;
– transporton per komfortaj klimatizataj turismaj busoj (kaj flugon Stokholmo-Kopenhago dum A2), dum A1 kaj P1. Por A2 oni uzos publikajn transportilojn;
– enirbiletojn al la vizitotaj lokoj laŭ la ekskursopriskriboj;
– Esperantajn ĉiĉeronojn.

La prezoj ne inkluzivas:
– ekstrajn elspezojn en la hoteloj, ekz. telefonvokojn;
– trinkaĵojn, krom se alie indikitaj;
– krommonon.

La ekskursoj A2 kaj P1 devas havi minimume 20 partoprenantojn, A1 minimume 30 partoprenantojn. Se estos malpli ol la necesa nombro de partoprenantoj en iuj ekskursoj, la prezoj altiĝos aŭ la koncernaj ekskursoj estos nuligitaj. En tiaj okazoj la mendintoj estos ĝustatempe informitaj pri tio kaj povos ŝanĝi al alia aŭ entute nuligi sian mendon.

La ekskurso al Stokholmo (A2) kaj al Oslo (P1) povas havi maksimume 30 partoprenantojn!

La ekskurso al Oslo (P1) ne havas unulitajn ĉambrojn!

Antaŭkongresaj ekskursoj

A1 Fabela Danio

20-22 julio, 3 tagoj/2 noktoj

20.07 Ekiro de antaŭ la kongresejo Bella Center je la 9-a horo matene. Survoje al Jutlando la ekskurso haltos en Roskilde por viziti la duspiralturan katedralon. El la 12-a jarcento sed kun aldonoj en diversaj periodoj, ĝi estas la tradicia tombejo de la danaj monarkoj, kun pli ol 40 reĝaj tomboj. Lunĉo en Roskilde, ĉe Knapsø-lageto. Daŭrigo al Århus kaj enhoteliĝo ĉe Scandic Hotel Plaza. Ĝi situas inter la muzika halo, urbodomo kaj la urbodoma parko. En la hotelo estas la restoracio Brazil, kie oni servas per diversaj viand-rostaĵoj laŭ la brazila stilo. Vespermanĝo en la bierejo Sankta Clemenso, ĉarma loko kie oni produktas proprajn bierojn ĉe la vido de la klientoj.

21.07 Matenmanĝo kaj vizito al la urbo. Århus estas la dua plej granda urbo en Danio. Oni trapasos la urbodomon kaj universitaton, kaj piediros tra la subĉiela muzeo Den Gamle By, kiu konsistas el lignoframaj domoj de inter 1550 kaj 1850, el diversaj partoj de Danio (enirbileto DKK 100 pp). Daŭrigo al la katedralo, ekkonstruita en 1201, kiu havas belegajn murpentraĵojn kaj unikan altaron. Trapaso de Marselisborg-palaco, la somera rezidejo de la dana reĝa familio, lunĉo kaj daŭrigo al Himmelbjerget kaj la laga distrikto. La plej malnova radvaporŝipo kiu uzas la originalan vapormaŝinon estas Hjejlen, kiu ekde 1861 krozas sur la Silkeborg-lagoj. Ĝi kaj ses aliaj ŝipoj iras inter Silkeborg kaj Himmelbjerget, kaj inter Himmelbjerget kaj Laven dum la somero.

Ĝuu la belegan pejzaĝon de la lagoj dum la vojaĝo de Silkeborg al Himmelbjerget. Daŭrigo al Odense kun mallongaj haltoj en Jelling kaj Kolding. En Jelling estas nacia historia loko, t.e. la loko kie la prauloj de reĝino Margrethe la Dua estis enterigitaj. La senrompa linio de danaj monarkoj, pli ol miljara, jam de la epoko de la vikingoj, igas Danion politike la plej malnova nacio en la mondo. Oni vidos ankaŭ la entombig-lokojn de la reĝo Gorm la Olda kaj reĝino Thyra. Daŭrigo al la kastelo Koldinghus, konstruita en 1268 laŭ peto de la reĝo Erik Glipping. Postaj generacioj konstruis la protestantan preĝejon kaj gigantan turon. En 1808 fajro detruis la tuton kaj en 1989 oni restaŭris la ruinojn kun moderna dezajno. Alveno en Odense kaj enhoteliĝo en First Hotel Grand, konstruita en 1897 kaj renovigita en 2008. Vespermanĝo en la hotelo.

22.07 Matenmanĝo kaj vizito tra Odense, la tria plej granda urbo en Danio, kaj ĉirkaŭaĵoj. Bonvenon al la "Ĝardeno de Danio", kiel oni poezie nomas la etan insulon Funen, kaj bonvenon al la lulilo de H.C. Andersen, la mondfama fabelverkisto. Vizito al la Andersen-muzeo, kiu havas i.a. liajn librojn, desegnaĵojn, leterojn kaj la famajn bastonon kaj pintĉapelon. Trapaso de la urbodomo, de la impona gotika Katedralo de Sankta Canute. Lunĉo ĉe Den Gamle Kro en Odense. Vizito al la subĉiela muzeo de la Funen-vilaĝo kun kolekto de malnovaj konstruaĵoj el la tuta Funen-insulo, kiu kreas la etoson de antikva vilaĝo. En la fino de la posttagmezo ekveturo al Kopenhago. Alveno ĉe la kongresejo kaj fino de la servoj.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 613 EUR; dulita 539 EUR.

Ekstraj noktoj en Kopenhago en hotelo Bella Sky. Loko en unupersona ĉambro 114 EUR; dulita 64 EUR.

A2 Mirinda Stokholmo, Svedio

19-23 julio, 5 tagoj/4 noktoj

19.07 Alveno ĉe la hotelo Stallmästaregården (Norrtull, SE-113 47 Stockholm. Telefono +46 8 610 1300). Vespermanĝo kaj klarigoj pri la programo por la venontaj tagoj.

20.07 Matenmanĝo. Vizito al muzeoj: Wasa, kie endome troviĝas ŝipo el la 17-a jarcento komplete konservata, unika en la mondo; Skansen, subĉiela muzeo kun antikvaj domoj kaj ankaŭ bestoĝardeno; Waldemarsudde, iama hejmo de la sveda princo Eugen, kiu mem estis artisto-pentristo. Lunĉo. Vespera renkontiĝo kun lokaj esperantistoj.

21.07 Matenmanĝo. Vizito al la Nacia Arta Muzeo, Reĝa Palaco kaj malnova urboparto, kie troviĝas konstruaĵoj de la 16-a ĝis la 18-a jarcentoj. Libera tempo por memstara esplorado de la urbo.

22.07 Matenmanĝo. Vizito al la biblioteko de Hagströmer en belega domo el 1907, ĉe la parko de la Palaco Haga, rezidejo de la kronprincino kaj ŝia edzo, kaj promeno tra la vasta palaca parko. Libera posttagmezo – oni rekomendas ŝipe veturi tra la urbo.

23.07 Matenmanĝo. Transporto al la flughaveno. Flugo al Kopenhago. Fino de la servoj.

Lokojn en la aviadilo al Kopenhago ricevas nur tiuj, kiuj mendas tiun ĉi ekskurson ĝis la 25-a de marto! Post tiu dato oni devos mem aranĝi la vojaĝon el Stokholmo al Kopenhago. La ekskurso ne estas rekomendinda al handikapitoj, pro la uzo de publikaj transportiloj.

Prezoj: Loko en ĉambro: unupersona 1175 EUR; dulita 735 EUR.

Postkongresa ekskurso

P1 Nobela Oslo, Norvegio

30 julio – 2 aŭgusto, 4 tagoj/3 noktoj

30.07 Ekiro de la ŝipo al Oslo je la 17h00. Vespermanĝo kaj prelego pri Oslo kaj Norvegio.

31.07 Matena alveno en la haveno de Oslo. Piedirado tra la urbocentro. La ĉefstrato, Karl Johans gate, ligas rektlinie la ĉefan stacidomon (Oslo S) al la Reĝa Palaco, kiu situas majeste sur altaĵeto. Survoje oni vidos la katedralon, konstruitan en 1697, la parlamentejon, la Nacian Galerion, la Nacian Teatron, kaj la malnovan parton de la universitato. Pli proksime al la haveno staras la urbodomo kaj la Nobel-pacocentro. De la supro de la fortikaĵo Akershus oni havas elrigardon al la plej grandaj kaj proksimaj insuloj. Post la lunĉo oni iras al la Reĝa Palaco por unuhora gvidata vizito kaj poste al la Nacia Galerio, kie oni vidas i.a. la ĉambron kun pentraĵoj de Edvard Munch. Per metroo oni iras viziti la faman Vigeland-statuaron. Vespermanĝo en la hotelo (Hotelo Perminalen, Øvre Slottsgate 2, NO-0157 Oslo; ☎+47 2400 5500).

01.08 Post la matenmanĝo oni prenas pramboaton al la duoninsulo Bygdøy, kie troviĝas pluraj muzeoj: de popolkulturo (tradiciaj domoj kaj metioj), de martrafiko kaj tri muzeoj tute specialaj (de vikingaj ŝipoj, de la Kon-Tiki-floso kaj de la polus-esplora ŝipo "Fram" de Fridtjof Nansen). Post la lunĉo oni promenos malsupren sur verdaj vojetoj laŭ la rivero Akerselva tra protektata kultura areo, al la urbocentro. Vespermanĝo en ĝardeno hejme ĉe loka esperantistino.

02.08 Post la matenmanĝo oni veturos per buso 50 kilometrojn nordorienten de Oslo, al malnova bieno (nun agrikultura muzeo) Gamle Hvam, kie la domoj staras preskaŭ neŝanĝitaj. En la ĉefdomo, starigita en 1728, oni povas vidi kiel bonhavaj norvegaj kamparanoj loĝis antaŭ du jarcentoj. Tiu domo estas unu el la plej grandaj malnovaj domoj en la orienta Norvegio. Leĝera lunĉo. Busveturo al Eidsvoll, al la domo kie 112 viroj verkis la norvegan konstitucion kaj deklaris Norvegion sendependa regno en 1814, kaj vizito al la muzeo de Wergeland. Fine la buso veturos al la flughaveno Gardermoen kaj reen al Oslo. Fino de la servoj.

En tiu ĉi ekskurso ne eblas mendi unulitan ĉambron! Bantukoj estas inkluzivigitaj nur en dulitaj ĉambroj. La dulitaj ĉambroj havas etaĝlitojn, t.e. unu super la alia.

Prezo: Loko por persono en ĉambro: dulita 414 EUR; trilita 394 EUR.

Ekstraj noktoj en Oslo en hotelo Perminalen. Prezo por persono en ĉambro: dulita 60 EUR; trilita 52 EUR.

Dumkongresaj ekskursoj

Kiel mendi ekskursojn?
Bonvolu atente tralegi la priskribojn kaj elekti. Post la elekto, plenigu klare kaj atente (preslitere) la koncernan parton de la mendilo kaj sendu ĝin samtempe kun via pago al Roterdamo. Prefere uzi la retan mendilon. Se en via lando estas kongresa peranto, vian mendon/pagon vi povas sendi al ŝi aŭ li. Por malmendoj validas la kondiĉoj presitaj dorsflanke sur la mendilo. Bv. ĉiam sendi la mendilon kaj pagon al la sama adreso, t.e. instanco.

Ĝeneralaj kondiĉoj
Ĉar ĉiuj ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizanto rezervas al si la rajton eventuale nuligi iujn ekskursojn, pri kio ni klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la kongreso, kun propono de eblaj alternativoj.

Ĉiuj ekskursoj startas de antaŭ la kongresejo. Klopodu veni dek kvin minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso. Ĉiujn ekskursojn akompanos esperantlingvaj interpretistoj. Ili ne estas profesiaj ĉiĉeronoj sed nur bonvolaj helpantoj. Bv. indulgi ilin per pacienco kaj samideana komprenemo. Ili faros sian plejeblon por bone servi al vi. Ĉiuj prezoj estas en eŭroj (EUR).

Kun la kongresaj dokumentoj ĉiuj mendintoj ricevos koverton kun la menditaj kongresaj biletoj. Sur la biletoj estos bazaj informoj pri la ekskurso (dato, horo, buso), kiuj eventuale povos malsami ol tiuj presitaj en la Dua Bulteno. Kaze de malsameco validas la informoj sur la biletoj. Ne forgesu preni ŝirmilojn kontraŭ suno kaj varmo! Bv. noti ke la tereno en kelkaj ekskursoj povas esti netaŭga por homoj kun marŝ-handikapoj. La priskriboj de la ekskursoj kutime mencias tion.

Servoj inkluzivigitaj:
– ĉiĉeronado de loka turisma servo kaj esperantlingva ĉiĉerono;
– vojaĝo per altkvalitaj busoj (ne kiam temas pri piedira, publiktransporta, ŝipa ktp ekskurso!);
– enirbiletoj de la vizitataj lokoj.

Ni rekomendas al la partoprenantoj de la dumkongresaj ekskursoj porti komfortajn ŝuojn, leĝerajn vestaĵojn, sunprotektan kremon kaj sunŝirmilon (ĉapon, sunombrelon aŭ simile).

Tuttagaj ekskursoj

La tuttagaj ekskursoj okazos precipe en merkredo, la 27-a de julio, sed ankaŭ en aliaj tagoj. La prezoj inkluzivas enirbiletojn kaj, se indikite, tagmanĝon. Ĉiuj ekskursaj busoj estas altkvalitaj kaj klimatizitaj.

E1 Kastela Nord-Zelando

Lundo kaj merkredo *9h00 – 16h00* *Prezo: 102 EUR*

La reĝoj kaj nobeloj konstruigis tra la jarcentoj diversajn kastelojn en la ĉirkaŭaĵo de Kopenhago, por ke tiuj ejoj estu someraj aŭ/kaj feriaj palacoj. Preterpasinte Hvidøre-palacon, nuntempe flegejon, Deer-parkon kaj diversajn vilaĝetojn, oni atingas la Kronborg-kastelon en Helsingør, ĵus enirintan la liston de Unesko kiel monda heredaĵo kaj monde konata pro tio ke ĝi estas la loko kiu inspiris Ŝekspiron verki *Hamleto, princo de Danio*. Post lunĉo vizito al la Fredensborg-palaco, aŭtuna kaj printempa rezidejo de la reĝa familio. Daŭrigo al Hillerød kaj vizito al la Frederiksborg-kastelo, unu el la plej belaj renesancaj arkitekturaĵoj en Nordio. Nuntempe ĝi estas la sidejo de la Muzeo de Nacia Historio kun danaj pentraĵoj, porcelan-, arĝent-, tapiŝ- kaj meblokolektoj. Reveno al la kongresejo tra kampara kaj agrikultura regiono.

E2 Vikingoj

Mardo kaj merkredo *10h00 – 15h00* *Prezo: 57 EUR*

La vikingoj ne nur estis batalantaj gigantoj, sed laŭ arkeologiaj eltrovoj ili ankaŭ disvolvis kompleksan kaj organizitan civilizacion. Ĉefe la maraj, sed ankaŭ la agrikulturaj vikingaj tradicioj havis grandan influon en la dana disvolviĝo tra jarcentoj. La ekskurso iras tra kamparaj vilaĝoj, kelkaj fonditaj de vikingoj antaŭ pli ol mil jaroj, kaj preter kelkaj entombigaj montetoj. Alvenante en Roskilde, ĝis 1417 la ĉefurbo de Danio, oni vizitos la Vikingŝipan Muzeon, kiu enhavas la restaĵojn de kvin vikingaj ŝipoj, eltiritaj el la fundo de la Roskilde-fjordo, kie ili estis sinkigitaj antaŭ pli ol mil jaroj por eviti ke malamikoj havu aliron al la urbo el la maro. Daŭrigo al la urba katedralo, kie troviĝas la tomboj de pli ol kvardek danaj nobeloj.

E3 Svedio

Merkredo *9h00 – 16h00* *Prezo: 89 EUR*

Post la transiro de la ponto, kiu kunigas ambaŭ landojn, restas mallonga vojo ĝis la urbocentro de Malmö, la tria plej granda urbo de Svedio. Post mallonga urba promena enkonduko, oni lunĉos en unu el la bonegaj restoracioj de la urbo. Daŭrigo al la universitata urbo Lund, kie oni vizitos la imponan katedralon, memoraĵon el la tempo kiam Lund estis la religia, kultura kaj komerca gvidanto en Skandinavio. Reveno tra Malmö al Kopenhago laŭ la sama vojo.

E4 Kastela Sud-Zelando

Merkredo kaj ĵaŭdo *8h00 – 16h00* *Prezo: 99 EUR*

Per tiu ĉi ekskurso oni konatiĝos kun la rokoko-palaco de la nobela familio Reedtz-Thott, vilaĝo Karrebæksminde kaj Holsteinborg-kastelo. Survoje suden halto ĉe la Køge-preĝejo, el la 13-a jarcento. Daŭrigo kaj vizito al la Gavnø-kastelo, situanta en la Insulo de Floroj. Aĉetita de pirato fare de reĝino Margrethe la Unua, ĝi iĝis monaĥejo por needziniĝintaj virinoj de nobela deveno. Nuntempe ĝi estas la plej bela rokoko-kastelo de Danio, kun la plej granda privata kolekto de pentraĵoj en Skandinavio, impona manĝoĉambro kaj ĉarme meblitaj gastoĉambroj. Vizito al la Gavnø-monaĥeja preĝejo,

Gavnø-ĝardeno kaj la domo de la papilioj. Veturo tra Karrebæksminde, pitoreska fiŝista vilaĝo. Lunĉo. Vizito al la Holsteinborg-kastelo, kie H. C. Andersen vivis dum iom da tempo. La du studioj de Andersen restas netuŝitaj ekde kiam li vivis en la kastelo. La kastelo havas belegan ĝardenon. Revene trans la Tystrup-lago kaj tra la urbo Sorø.

E5 Odense

Merkredo kaj vendredo *8h00 – 17h00* *Prezo: 118 EUR*

La insulo Funen, kie situas Odense, estas poezie nomata la "Ĝardeno de Danio". Tie estas diversaj kasteloj kaj palacoj, kelkaj viziteblaj, aliaj rigardeblaj nur de for. La ponto kiu ligas Zelandon kun Funen estis inaŭgurita en 1998 kaj estas la dua plej granda en la mondo el tiu speco. Alveno en Odense, la tria plej granda urbo en Danio, preterpasinte la belegan Funen-an pejzaĝon. Vizito al la zorge renovigitaj H. C. Andersen-instalaĵoj. La muzeo havas liajn librojn, desegnaĵojn, leterojn kaj personajn objektojn. Preterpaso ankaŭ tra la infanaĝa domo de la verkisto. Daŭrigo tra la urbodomo kun bronza fontano, kaj tra la impona gotika Katedralo de Sankta Canute. Lunĉo. Vizito al Funen-vilaĝo, kiu estas subĉiela muzeo de bienoj, domoj kaj ĉiutaga vivo en la insulo dum la pasintaj jarcentoj.

Duontagaj ekskursoj

D1 Kopenhago

Sabato, dimanĉo	*14h00 – 17h00*	
Lundo	*08h00 – 11h00*	*Prezo: 35 EUR*

Urba kaj havena rigardado montras la ĉefajn lokojn de Kopenhago. Oni preterpasos i.a. Kongens Nytorv, la Amalienborg-palacon (rezidejon de la reĝa familio), urbodoman placon, Tivoli-ĝardenojn kaj la Novan Carlsberg Glyptotek. Ĉe la Gammel-strando, antikva Malnova Fiŝbazaro, oni ŝanĝas de buso al ŝipeto, kiu krozos tra la kanaloj de Christianshavn, kun vido al la malnovaj kaj pitoreskaj konstruaĵoj, al la preĝejo Nia Savanto kaj diversaj aliaj vidindaĵoj kun halto ĉe la statuo de la Marvirineto, la nacia ikono el fabelo de H.C. Andersen.

D2 Reĝa ekskurso

Dimanĉo, lundo *13h00 – 16h00*
Ĵaŭdo *10h00 – 13h00* *Prezo: 36 EUR*

Kopenhago havas longegan historion kiel "reĝa" urbo, eĉ de antaŭ 1417, kiam ĝi estis proklamita la nacia ĉefurbo, i.a. pro sia situo, strategie en kruciĝo de la komercado inter la kontinenta Eŭropo kaj Skandinavio. Kun tiu decido ankaŭ la nobelaro translokiĝis al la urbo kaj portis siajn riĉaĵojn, kiun ni nuntempe povas admiri vizitante la palacojn, domegojn kaj preĝejojn. La ekskurso iras al la Christiansborg-kastelo ĉe la koro de la urbo, ekde 1794 la hejmo de la dana reĝa familio. Post rekonstruo inter 1907 kaj 1928, ĝi iĝis la sidejo de la parlamento kaj loko kie la reĝino akceptas gastojn. La Kavalira Halo havas belegajn tapiŝojn kaj kandelabrojn. De la palaco la ekskurso revenas al la kongresejo, preterpasante la borson kaj la koron de la urbo, la Amalienborg-palacon (rezidejon de la reĝa familio), la Reĝan Teatron, urbodomon, Tivoli-ĝardenojn kaj la Marvirineton.

D3 Carlsberg-bierejo

Mardo, vendredo *10h00 – 13h00* *Prezo: 33 EUR*

Ĉe la alveno en la bierejo kvar granitaj elefantoj en reala grandeco bonvenigas la vizitantojn. Ili estis menditaj de Carl Jacobsen, filo de Jacob Christian Jacobsen, la fondinto de la Carlsberg-bierentrepreno. Carl respondecis ankaŭ pri la fondo de la nova Carlsberg Glyptotek kaj la Marvirineto. La bierejo troviĝas en la originala biereja konstruaĵo de 1847. La ekskurso iras ekde la grenejo tra la ĉevalejo kaj malnova vilao de J. C. Jacobsen. Diversaj ekspozicioj rakontas la evoluon de la bierejoj (Carlsberg kuniĝis kun Tuborg) kaj montras la novajn kaj malnovajn teknikojn de bierfarado. Post la ekskurso oni gustumos la produkton.

D4 Louisiana-muzeo

Dimanĉo, mardo, ĵaŭdo *14h00 – 18h00* *Prezo: 42 EUR*

La muzeo troviĝas en antikva parko ĉe la Nord-Zelanda marbordo. Ĝi enhavas ege interesajn kolektojn de moderna arto de internaciaj artistoj, kiel ekzemple Arp, Francis Bacon, Dubuffet, Giacometti, Henry Moore, Picasso kaj Warhol, kaj ankaŭ de la klasikaj majstroj de moderna arto. Louisiana ne estas nura sinonimo de moderna kaj nuntempa arto, sed pensiga pri la ludo inter arto, arkitekturo kaj pejzaĝo. La parko estas uzata por ekspozicii artaĵojn el la kolekto de modernaj skulptaĵoj.

Semajna skemo de ekskursoj

T = tuttaga ekskurso; **M** = duontaga ekskurso matene; **P** = duontaga ekskurso posttagmeze.

	Sab23/07	Dim 24/07	Lun 25/07	Mar 26/07	Mer 27/07	Ĵaŭ 28/07	Ven 29/07	Prezo
E1 Nord-Zelando			T		T			102 EUR
E2 Vikingoj				T	T			57 EUR
E3 Svedio					T			89 EUR
E4 Sud-Zelando					T	T		99 EUR
E5 Odense					T		T	118 EUR
D1 Kopenhago	P	P	M					35 EUR
D2 Reĝa ekskurso		P	P			M		36 EUR
D3 Carlsberg-bierejo				M			M	33 EUR
D4 Louisiana-muzeo		P		P		P		42 EUR

Bankedo

La bankedo okazos lundon, la 25-an de julio, je la 19h30, en salono Hodler.

Antaŭplado

Terpoma kaj porea supo ♣

Terpoma kaj porea supo kun salikokoj

Ĉefa plado

Fungoj kun gratenita kremo akompanataj de bakita terpomaĵo ♣

Kokida fileo kun petrosela saŭco,
terpoma cilindro kun sovaĝaj fungoj kaj vegetaĵoj

Deserto

Blankĉokolada piramido kun pasifrukto

Trinkaĵoj

Glaso da blanka vino

Du glasoj da ruĝa vino

Kafo

Akvo

Prezo: 65 EUR

♣ = *vegetara varianto*

Provizora programo

Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.

Sabato, 23 julio. Loĝigo. Malfermo de la kongresejo je la 9h00. Alveno de kongresanoj kaj registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj (17h00). Artistoj. Libroservo. Movada Foiro / Interkona Vespero. Giĉetoj funkcias ĝis la 18h00.

Dimanĉo, 24 julio. Solena Inaŭguro (10h00). Ekumena Diservo. Inaŭguro de IKU / AIS. Kongresa Temo. Paroligaj Kursoj. Dana Eksprese. Libroservo. Nacia Vespero.

Lundo, 25 julio. Kleriga Lundo. ILEI. IKU-prelegoj. Terminologia Forumo. Paroligaj Kursoj. Dana Eksprese. KER-Ekzamenoj (registriĝo). Libroservo. Bankedo. Balo.

Mardo, 26 julio. Tago de la Lernejo. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Paroligaj Kursoj. Dana Eksprese. KER-Ekzamenoj. Estraro Respondas. Landa Agado. Delegita Reto. Libroservo. Societo Zamenhof. Teatro.

Merkredo, 27 julio. Tuttagaj ekskursoj. Kongresejo fermita.

Ĵaŭdo, 28 julio. Tago de la Libro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Belartaj Konkursoj. Paroligaj Kursoj. KER-Ekzamenoj. CO Respondas. Urba Akcepto (por invititoj). Libroservo. Koncerto.

Vendredo, 29 julio. Komitato de UEA. IKU-prelegoj. Paroligaj Kursoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Ĉefdelegitoj kaj Perantoj. Venontaj UK-oj. Libroservo. Internacia Arta Vespero.

Sabato, 30 julio. Solena Fermo (10h00). Libroservo (ĝis la 14h00). Fermo de la kongresejo (14h00).

Programeroj dum UK

Novtipaj KER-ekzamenoj de UEA je tri niveloj. La novtipa KER-ekzamensistemo de UEA funkcias jam de januaro 2009. En la unuaj du jaroj en 15 sesioj ekzameniĝis 273 personoj el 31 landoj. Dum la kongreso okazas ĉiam la ĉefa ekzamensesio de la jaro, tial ankaŭ en Kopenhago estos eblo trapasi la ekzamenojn je ĉiuj tri niveloj: B1, B2 kaj C1. Ekzameniĝi eblas ne nur en la kompleta formo, sed ankaŭ en nur unu el la ekzamentipoj: skriba aŭ parola.

La ekzamensistemo estas ellaborita surbaze de la manlibro de la Konsilio de Eŭropo, *Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado*. La sukcesaj trapasintoj de la ekzameno ricevos kvarlingvan diplomon (en Esperanto, angla, franca kaj germana) eldonitan de ITK, la ŝtate agnoskita, plej granda ekzamencentro de Hungario.

La plurhoraj skribaj sesioj kaj la aŭdkomprena parto de la ekzameno okazos vendredon, la 29-an de julio, fruposttagmeze. Por la parola parto (20-minuta individua sesio) oni povas elekti tempon laŭ la vico de la aliĝoj, jam antaŭ la UK aŭ surloke.

Aliĝi al la ekzamenoj eblos ankoraŭ dum la kongreso, sed por la parola parto la ekzamenebloj estas limigitaj. Ju pli frua aliĝo, des pli granda ŝanco ricevi ekzamenlokon.

La ekzamenkotizoj estas diversaj, laŭ la land-kategorioj de la membrokotizoj de UEA. La kotizo pageblas per antaŭa ĝiro al UEA-konto, aŭ surloke ĉe la kongresa kaso.

Interesiĝantoj povas peti ekzamenspecimenojn kaj helpon ĉe la teamo de www.edukado.net.

Pliajn informojn pri la ekzameno (postuloj, prezoj, statistiko, specimenoj ktp) legu kaj akiru:

– en la libro *Esperanto de nivelo al nivelo*;
– ĉe http://edukado.net/ekzamenoj/ker (rekta aliĝo eblas ĉe http://edukado.net/alighilo?id=2011DK-UKOP);
– aŭ petu ĉe katalin@ikso.net.

Paroligaj kursoj kun edukado.net. Kiel tradicie jam de pluraj jaroj la porinstruista retejo edukado.net denove gvidos paroligajn kursojn por la partoprenantoj de la UK. La du paralelaj kursoj – kiuj okazos dufoje tage dum kvar tagoj de la UK-semajno, do entute ok fojojn – estas celataj por komencantaj (A1, A2) kaj meznivelaj (B1, B2) parolantoj de la internacia lingvo. Ankaŭ observantoj de la instrulaboro estas bonvenaj. La kursmaterialo por komencantoj estas la eldonaĵo *Poŝamiko* (5 EUR); en la alia nivelo oni estos petata kontribui al la kopikostoj. Antaŭa aliĝo ne estas bezonata. La programojn gvidos la konataj Esperanto-pedagogoj s-ino Katalin Kováts kaj s-ro Sylvain Lelarge.

Unua sesio de ekzamenoj por blinduloj. Dum la UK en Kopenhago okazos la unua sesio de ekzamenoj por blinduloj pri lingvokono. Du tre kompletaj kaj precizaj regularoj troviĝas ĉe http://www.edukado.net/ekzamenoj/ilei/blinduloj kaj ĉe http://ilei.info/instancoj/Ekzamenoj%20por%20blinduloj%20detala%20regularo%20kun%20poentokalkulado.pdf. Interesatoj bonvolu anonci sin ĉe la prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono, Mirejo Grosjean (Svislando), ĝis la 31-a de majo 2011: ❑mirejo.mireille@gmail.com; ☎+41 32 932 18 88. Bv. sciigi viajn kompletan nomon, devenlandon kaj aĝon.

Kiu kongresas kiam kaj kie?

42-a Internacia Infana Kongreseto (IIK), 23-30 julio 2011 en Hundested, Danio. Informoj ĉe la TTT-ejo: http://bertosch.free.fr/iik2011, kaj ĉe la respondeculo de IIK, s-ro Bert Schumann, retadreso infana.kongreseto@gmail.com aŭ bertox@free.fr.

44-a ILEI-Konferenco, 17-23 julio 2011 en Kopenhago, Danio. La konferenca temo estas: Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado. Pliaj informoj, kotizoj, fotoj kaj aliĝilo troviĝas ĉe la TTT-ejo de la konferenco: http://www.ilei.info//agado/Kopenhago2011.php.

67-a Internacia Junulara Kongreso (IJK), 14-21 julio 2011 en Kievo, Ukrainio. Informoj en la TTT-ejo: http://www.ijk-67.retejo.info. Aliĝoj pere de la retadreso: ijk2011@tejo.org. Pliaj informoj ankaŭ ĉe TEJO/IJK, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎+31 10 436 1044, 🖷+31 10 436 1751; 🖳oficejo@tejo.org.

Ĝeneralaj informoj

Disdonado de propagandiloj kaj informiloj. Universala Kongreso estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri iu nova iniciato, pri specialaj agadoj de via faka asocio, por reklami novan eldonaĵon aŭ revuon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, por anonci iun renkontiĝon, kursaron, varon. La plej efika maniero estas enmeti la informilon en la dokumentujon kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo estas aparte pagenda (275 eŭroj), kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA por disdonado (bv. kontakti la CO de UEA). Neniu dokumento rajtas esti distribuata en la kongresejo sen permeso de la Estraro.

Salonmendoj kaj standoj (budoj). Ĉiuj fakaj asocioj konataj al UEA ricevis mendilon por havi salonon por sia kunveno dum la UK, se ili tion bezonas. Salonmendoj devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 31-a de marto de la kongresa jaro. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate, kaj eblas postuli por ili ekstran lupagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocioj. Se via asocio ankoraŭ ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso. Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj kiuj volas aparte efike informi kongresanojn, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s., povas mendi budon (standon) dum la kongreso (380 eŭroj). Tiujn budojn oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.), sed jes por kolekti mendojn.

Kongresa Libroservo. Universala Kongreso estas okazo ankaŭ por aktualigi vian bibliotekon, aĉetante en la plej riĉa E-vendejo de la jaro: la Kongresa

Libroservo. Multaj novaj libroj, interalie el la kongreslando mem, estos unuafoje lanĉitaj en la Kongresa Libroservo, en kiu plurajn titolojn eblos aĉeti ankaŭ kun speciala rabato. La Kongresa Libroservo havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK. Se vi aŭ via asocio volas vendigi viajn eldonaĵojn, necesas ke vi ofertu ilin al la Libroservo de UEA (CO) minimume du monatojn antaŭ la kongreso.

Pagmanieroj. Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn kongresajn mendojn. Elektu tiun kiu estas por vi la plej oportuna kaj plej malkara. Tamen bv. noti ke la plej sekura kaj rapida vojo estas poŝta aŭ banka monĝiro. Se vi mendas proksime al la limdatoj, bv. ankaŭ noti ke pagoj al poŝtaj kontoj ekster Nederlando (Germanio, Svedio k.s.) povas foje daŭri eĉ unu monaton. Nepre konsideru malfermon de konstanta konto ĉe UEA, ĉar tio havas plurajn avantaĝojn. Bonvolu ĉiam sendi pagojn kaj rilatajn mendilojn al la sama instanco. Kotizojn kaj donacojn al la bonfaraj kasoj oni prefere pagu al la landa peranto (vidu la liston de la oficialaj perantoj sur la interna dorskovrilo).

Pagojn por loĝigo, ekskursoj kaj bankedo faru rekte al Universala Kongreso de Esperanto en unu el la jenaj manieroj:

– ING-konto n-ro 62 73 37 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto en Rotterdam. IBAN-numero: NL96INGB0000627337, SWIFT (BIC)-kodo: INGBNL2A.

– ABN-Amro-konto n-ro 42.69.01.444 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto, Rotterdam. IBAN-numero: NL86ABNA0426901444. SWIFT (BIC)-kodo: ABNANL2A.

– UEA-konto: personoj kun sufiĉa bonhavo ĉe UEA povas sendi mendilojn kaj peti debeton al sia persona konto.

– monbiletoj: oni povas sendi monbiletojn (en eŭroj aŭ valuto ŝanĝebla al eŭroj) al la konstanta adreso, prefere en registrita koverto.

– al la poŝtokonto en la nomo de Universala Esperanto-Asocio en Belgio: 000-1631831-97 / Germanio: Köln 3182.91.509 BLZ 370 100 50 / Svedio: 74374-0 / Svislando: Bulle 12-2310-0.

Pagante per banka ĝiro de ekster Nederlando, nepre aldonu 10 eŭrojn por la bankkostoj.

Se vi pagos per banka ĉeko, sendu ĝin al la konstanta adreso. La ĉeko estu en eŭroj kaj nepre aldonu 20 eŭrojn por la bankkostoj! Prefere ne sendu ĉekojn kiuj ne estas titolitaj al unu el la bankoj en Nederlando. Kostoj por ili povas esti tre altaj. Ne forgesu ĉiam klare indiki la celon de via pago.

Kreditkartoj. Eblas pagi ankaŭ per kreditkartoj Visa, Eurocard, Mastercard kaj American Express, indikante la numeron de la karto, la daton ĝis kiam ĝi validas, kaj la 3-kontrolciferojn malantaŭe sur la kartoj (CVC-numero). En tiu kazo la pagata sumo tamen devas esti plialtigita per 5% pro administraj kostoj, tiel ke por grandaj sumoj estas konsilinde uzi alian pagmanieron.

Asekuro. La kongreskotizo inkluzivas nenian asekuron. Necesas do, ke ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga asekuro ekz. kontraŭ akcidento kaj malsano dum la kongreso. La kongreso ne repagas mendojn (ekzemple por loĝado, ekskursoj, bankedo), se la malmendo venas post la difinita limdato. Ĉar temas pri relative grandaj monsumoj, estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno. Pri tio konsultu vian kutiman asekuriston.

Donacoj. La kongreso bonvenigas donacojn por la ĉi-subaj celoj:
– Adoptaj Gepatroj: subvencias partoprenon en la Internacia Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj.
– Fondaĵo Canuto: helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.
– Triamonda Kaso: helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.
– Blindula Kaso: helpas al blindaj kongresanoj.
– Volontula Fondaĵo: subtenas volontulan servon ĉe la Centra Oficejo.
– Ĝenerala Kaso: por la ĝenerala subteno al la organizado de la UK. Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo Esperanto.

Kontaktinformoj

Centra Oficejo de UEA, Kongresa Administracio: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎+31 (0)10 436 1044, 🖷+31 (0)10 436 1751; 🖳kongresoj@co.uea.org. N.B. Pri ĉiuj aferoj bv. korespondi nur kun la CO kaj neniam skribi al LKK. LKK-anoj ne povas trakti individuajn petojn kaj leterojn kaj ne respondos ilin.

NOVA – MALNOVA

Hamleto, princo de Danujo. William Shakespeare. Trad. L.N.M. Newell. Moderna traduko de la tutmonde ege konata klasikaĵo, kiu sukcesas plene transdoni la belecon de la originalo. La Laguna: J. Régulo/Stafeto, 1964. 252p. 22cm. Prezo: € 9,00.

Hamleto, reĝido de Danujo. William Shakespeare. Trad. L.L. Zamenhof. Postparolo de H. Tonkin. La unua traduko, kun antaŭparolo kaj klarigo pri iuj dubaj punktoj. En nova vesto. Rotterdam: UEA, 2006 (9-a eld). 223p. 21cm. Prezo: € 9,00.

Kongresaj perantoj

Se estas en via lando, prefere sendu viajn mendilon kaj pagon al la peranto. Se ne, sendu la mendilon kaj pagon al Roterdamo. Mendojn sen pago oni ne traktos.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto House, 143 Lawson St, Redfern NSW 2016
Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg
Belgio: Claude Glady, 1 rue du Culot, 5630 Cerfontaine
aŭ Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
Britio: Esperanto-Asocio de Britio, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE
Ĉeĥio: Lucie Karešová, Havličkovo nám. 1, 13000 Praha
Ĉinio: Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, 100037 Beijing
Danio: Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4.tv., 2100 København
Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, 93812 Kuressaare
Finnlando: Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki
Francio: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris
Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz
Grekio: Helena Esperanto-Asocio, Aristidu 9, 105 59 Athina
Hispanio: Pedro A. Garrote Escribano, Apartado 119 Esperanto, 47080 Valladolid
aŭ Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, 08200 Sabadell
Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, Pf. 193, 1368 Budapest
Islando: Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, 101 Reykjavík
Israelo: Jehoŝua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 26373 Kirjat-Mockin
Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano
Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162-0042 Tôkyô
Kanado: Olga Du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saarnich, BC V8L 5G5
Korea Resp.: Korea Esperanto-Asocio, 1601 Kangbyon Hanshin Core B/D 1601, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul, 121-703
Kroatio: Boris Di Costanzo, set. Carmen Sylve 19, 51410 Opatija
Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības iela 35-13, Rīga 1045
Litovio: Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, 3000 Kaunas C
Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam
Norvegio: Agnar Fitjar, Wiers Jenssens vei 33A, 5089 Bergen
Nov-Zelando: David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch 8025
Pollando: Jan Książek, ul. Paderewskiego 6 m 2, 97-300 Piotrków Tryb
aŭ Jan Skonieczka, ul. Chłodna 23[a], 85-345 Bydgoszcz
Rusio: Miĥail Ĉertilov, P.f. 21, 143000 Moskva-Odincovo-6
aŭ Halina Gorecka, ab.ja. 1205, 236039 Kaliningrad
Serbio: Milica Ristić-Dokmanović, Bul. Oslobodjenja 29/II, 11000 Beograd
Slovakio: Lúbomír Fajth, 018 26 Plevník
Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35
Svislando: François Randin, Chemin de la Vallombreuse 14, 1004 Lausanne
Usono: Esperanto-USA, 5730 Hollis Street, Emeryville CA 94608

Flugante per Star Alliance vi ricevas ĝis 20% da rabato

La flugkompanioj de Star Alliance estas kontentaj esti la oficiala flugkompania reto por la 96-a Universala Kongreso de Esperanto.

Por ricevi la rabaton de la Star Alliance Conventions Plus-programo kaj por informoj pri la rezervoficejoj, bv. iri al www.staralliance.com/conventionsplus kaj:

1. elekti vian preferatan lingvon ĉe la supra dekstra angulo;
2. elekti “Kongresanoj”;
3. ĉe “Delegates Login” skribu la eventan kodon **SK10S11**;
4. elekti unu el la partoprenantaj flugkompanioj listigitaj;
5. elekti vian preferatan rezervoficejon kaj sciigi la eventan kodon **SK10S11** kiam vi rezervas vian flugbileton.

Aliĝintaj kongresanoj plus unu akompananto vojaĝantaj al la UK povas kvalifikiĝi por ricevi ĝis 20% da rabato, depende de la tarifo kaj klaso rezervita.

Partoprenantaj flugkompanioj: Scandinavian Airlines, Air Canada, ANA, Austrian Airlines, bmi, Lufthansa, Singapore Airlines, THAI, United, Asiana Airlines, LOT Polish Airlines, Spanair, TAP Portugal, SWISS International Air Lines, Air China, Turkish Airlines, EgyptAir, Croatia Airlines, Continental Airlines, Brussels Airlines, Blue1, TAM Airlines.

La rabatoj estas ofertataj por la plej multaj el la anoncitaj tarifoj en la komerca (business) kaj ekonomia (economy) klasoj, escepte de la tarifoj: ĉe retpaĝo/Interreto, por junuloj kaj maljunuloj, grupaj kaj Ĉirkaŭ la Mondo-biletoj.

Bv. atenti ke por flugoj el Japanio kaj Nov-Zelando la specialaj prezoj aŭ rabatoj estas ofertataj nur por la propraj flugoj de la partoprenantaj flugkompanioj.

Kiam vi rezervos la flugojn, bv. montri konfirmilon de via kongresaniĝo.

STAR ALLIANCE™
Kiel la Mondo konektiĝas.

ADRIA
AEGEAN
AIR CANADA
AIR CHINA
AIR NEW ZEALAND
ANA
ASIANA AIRLINES
Austrian
Blue1
bmi
brussels airlines
Continental Airlines
CROATIA AIRLINES
EGYPTAIR
LOT POLISH AIRLINES
Lufthansa
Scandinavian Airlines
SINGAPORE AIRLINES
SOUTH AFRICAN AIRWAYS
Spanair
SWISS
TAM
TAP PORTUGAL
THAI
TURKISH AIRLINES
UNITED
US AIRWAYS